Brazila Esperanto-Ligo
psviana@terra.com.br

Redaktas: Paulo Sergio Viana, Majo n-ro 5/2009

ESPERANTO EN LA FILOZOFIA FAKULTATO EN LORENA

De maldekstre: Paulo S. Viana, Prof. Lino Rampazzo kaj Alexandre P. Serafim

Je la 5-a de majo okazis prezento pri Esperanto ĉe la klaso de unua jaro de la Kurso de Filozofio de UNISAL – Lorena/Ŝtato San-Paŭlo. La iniciato estis de la Profesoro de Antropologio, Lino Rampazzo, kiu konstatis, ke ekzistas en la urbo monumento al Zamenhof kaj petis, ke studentoj mem prezentu la aferon al siaj kolegoj per seminario. Tion plenumis João Vagner, Daniel D. Matias kaj Monica A. Silva – ĉi tiu lasta eĉ salutis siajn kolegojn kaj la profesoron en Esperanto. Pro invito de la studentoj, apogis kaj ĉeestis la prezenton Alexandre P. Serafim kaj Paulo S. Viana, kiel reprezentantoj de Lorena Esperanto-Klubo. Oni montris librojn, sondiskojn, filmodiskojn kaj disdonis al la studentoj flugfoliojn. Al la profesoro, oni donacis ekzempleron de "La Strato Zamenhof". (Fotis Mônica A. Silva.)

"SUMIRE" EN POÇOS DE CALDAS / MG

La 5-a Sudminasa Renkontiĝo de Esperanto programiĝis por la 28-a de junio 2009, en la plaĉa, turisma urbo Poços de Caldas. La evento okazos ĉe Av. Padre Francis Cletus Cox, Auditório do Prédio 2, de la 8:30 h ĝis la 16:30 h. Densa kaj riĉa programo inkluzivas prelegojn, diskutojn, kurson por komencantoj, muzikon. Petu pli detalajn informojn de *jveiga51@yahoo.com.br* .

NOVAĴO EN LA LIBROSERVO: LA BIBLIO

Libroamantoj kaj perfektiĝemaj samideanoj rapidu mendi sian ekzempleron: la Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo proponas novan eldonon de la Biblio. Temas pri 1375-paĝa traduko de Zamenhof, Gerrit Berveling, Rust, Beveridge kaj Wilkinson, publikigita antaŭ nelonge de Eldonejo Kava-Pech, kunlabore kun Internacia Katolika Unuiĝo Internacia kaj Kristana Esperanto-Ligo. La volumo enhavas la Malnovan kaj Novan Testamentojn kaj la Duakanonajn Librojn. Ĝi aperis kadre de "Serio Oriento-Okcidento. Prezo: Prezo: R$ 75,00 (R$ 67,50 por membroj). Pagebla per Banco do Brasil, CC 402.706-X, Ag. 0452-9.

NOVAJ KURSOJ EN RIO KAJ NITERÓI

Ekde majo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj proponas novajn kursojn ĉe sia sidejo, Av. 13 maio 47, sl 208, tel. 2220-7486. Por faciligi la enskribiĝojn, la klasoj estas disponeblaj je 6 malsamaj semajntagoj, programitaj por 4-monata daŭro. Ili estos senpagaj: sufiĉas aĉeti la lernolibron. Preskaŭ samtempe, ankaŭ Niterói Esperanto-Klubo proponas kursojn por komencantoj (ĵaŭde) kaj por kursfinintoj (Konversacia Klubo, ĉiumarde, je la 17:30 h). Ambaŭ klasojn en Niterói gvidos la aktiva, kompetenta Aloísio Sartorato.

ESPERANTO NA FACULDADE DE FILOSOFIA DE LORENA/SP

Em 5 de maio último, por iniciativa do Professor Lino Rampazzo, de Antropologia do Curso de Filosofia da UNISAL, os alunos João Vagner, Daniel D. Matias e Monica A. Silva apresentaram aos seus colegas, em seminário, informações básicas sobre o Esperanto. O Professor foi motivado pela existência de um monumento a Zamenhof, em praça próxima à Faculdade. Prestaram apoio e comparececeram ao seminário membros do Clube de Esperanto de Lorena, Alexandre P Serafim e P.S.Viana. Foram distribuídos prospectos e um exemplar do livro "A Rua Zamenhof" foi oferecido ao Professor. A estudante Mônica A. Silva saudou os colegas em Esperanto e fotografou o encontro.

"SUMIRE" EM POÇOS DE CALDAS / MG

Marcado para 28/06/2009 o 5º Encontro de Esperanto do Sul de Minas: Av. Pe. Francis Cletus Cox, Auditório do Prédio 2, de 8:30 às 16:30 h. O programa inclui palestras, curso, debates e apresentação musical.

NOVIDADE NA LIVRARIA DA LIGA

O Serviço de Livros da nossa Liga Brasileira de Esperanto anuncia nova edição da Bíblia Sagrada em Esperanto, com inclusão dos livros ditos "apócrifos". A rica edição é parte da "Série Oriente-Ocidente". Preço: R$ 75,00 (R$ 67,50 para sócios), pagável pelo Banco do Brasil, CC 402.706-X, Ag. 0452-9

NOVOS CURSOS NO RIO E EM NITERÓI / RJ

Na Cooperativa Cultural dos Esperantistas, abertas turmas em 6 dias da semana. Em Niterói, às 3ªs e 5ªs-feiras. Divulgue!

21-a Esperanto-Renkontiĝo de la Urbo San-Paŭlo
Por pliaj informoj vizitu la adreson:
http://www.easp.org.br/erusp/kuriero.html

Envie-nos notícias sobre o que acontece no movimento esperantista em sua cidade!

BEL informas

Brazila Esperanto-Ligo
psviana@terra.com.br

Redaktas: Paulo Sergio Viana, Majo n-ro 5/2009

DU LOKAJ BULTENOJ

Antaŭen
Produzido pelo Clube de Esperanto de Três Rios
(TRIRIVERA ESPERANTO-KLUBO)
Rua XV de Novembro, 13 Sala 02 Centro Três Rios (RJ) triek@bol.com.br
200 exemplares

EDITORIAL

São diversos e de muitas facetas os caminhos da boa Educação. Entretanto, é de estarrecer, o artigo do jornalista Marcelo Coelho, na Folha de São Paulo de 04 de maio de 2008, intitulado **"o show de horrores dos colégios de elite"**. Alertava ele, na oportunidade, para o modelo de ensino praticado em tais instituições, que choca bastante quem está acostumado com o modelo "tradicional" de aulas, professores e provas.
Ele afirma que em tais instituições aplicam-se provas todos os dias.
As turmas são divididas de acordo com o desempenho individual. A matéria é passada visando os resultados no vestibular, com fórmulas e mais fórmulas a serem decoradas e, "macetes" para acertar questões. Esse método é que uma classe de educadores aliada a algumas autoridades e políticos como o senador Cristóvam Buarque, o condenam por se tratar de **"ensino de resultado"**.
Esse tipo de ensino é criticado não pela sua óbvia eficácia, mas pelo que estamos formando:
É esse o tipo de aluno que queremos? Uma constatação clara sobre tal sistema é que ele foca no aprendizado pelo negativo.
A conclusão a que se chega nesse método é demasiadamente dolorosa, pois não se está formando alunos pelo conhecimento das disciplinas curriculares, mas para exercer a negação, a limpeza, sem se importar com o aprendizado construtivo do cidadão social. A Escola, alheia ao programa de ensino qualitativo, o condiciona por vias tortuosas para passar no vestibular, preparando-o para cometer o mínimo de erros possíveis. Não importa como ele chegará à Faculdade. E é isso que assusta o jornalista e a todos aqueles que primam pela excelência dos métodos de ensino em nosso País.
Reflitamos sobre tal matéria e a combatamos se assim entendermos o problema.
Enfim, devido à abrangência e o universo que o processo educativo incorpora, tornam-se prioridades vitais os programas pedagógicos de regulação de sistemas e métodos de ensino – entre outros - desafio imposto pelo avanço progressista desses tempos modernos.
Então, aquilo que à primeira vista é considerado utópico e chocante, poderá tornar-se, num futuro próximo, se submetido a um processo de exclusão do impróprio, do nocivo, em instrumento útil, eficiente, inovador e, de legítima aplicação.
Será que a Educação voltada para resultados é tão nociva assim, como a entendemos?

A Diretoria

ATENÇÃO!
Em Maio/09, Congresso da AERJ em Petrópolis.

Du simpatiaj bultenoj anonciĝas. El Três Rios / RJ reta bulteno debutas, sub la redaktorado de Celso Tinta: *triek@bol.com.br* Kaj nova numero (88-a!) de la jam tradicia “AMEN!”, sub la respondeco de “Onklo Bidao”: *onklobidao@yahoo.com.br* . Bonan legadon!

UNU PLIA STRATO “ESPERANTO”

El la urbo Alvorada / RS venis la informo, ke Urbestro Joâo Carlos Brum sankciis leĝon 2040 de la 8-a de januaro 2009, kiu oficiale nomis Straton “Idioma Esperanto”, en la kvartalo “Jardim Alvorada”. Gratulon al la lokaj aktivuloj! (Informis Olavo Faustino)

PARANÁ LABORAS!

Ariádene M. Figueiró, Prezidanto de Paranaa Esperanto-Asocio, alvokis asembleon de la asocio en la pasinta 25-a de aprilo. Oni diskutis pri kursoj, celebrado de 84-jara vivo de la asocio, kaj disponigis dokumentojn al la membroj.

ESPERANTOMOVADO EN MONGAGUÁ

En la simpatia marborda urbo en ŝtato San-Paŭlo, funkcias de la jaro 2003 “Babilema Lernogrupo de Esperanto” (BLE), aliĝinta al la ŝtata asocio. Ĝi havas propran sidejon en la kvartalo Vera Cruz kaj programon por komencantoj kaj komencintoj, ĵaŭde kaj dimanĉe: kontaktu pertelefone: (13)35075792 aŭ 91639670. (Informis Eva do Esperanto.)

RENKONTO EN GOVERNADOR VALADARES / MG

Edvaldo S. Machado, Sekretario de Valadares Esperanto-Klubo, informas, ke la 12-a regiona renkonto de Esperantistoj okazos en tiu urbo, je la 6-a de decembro 2009, por festi la 50-jaran vivon de la urba klubo. Petu la programon kaj pliajn informojn telefone: (33)32714044, 32752566 aŭ 32753521. Kaj partoprenu amase!

UNU PLIA NUMERO DE “MOMENTON!”

Brazila Esperantista Junulara Organizo laboras. Ĵus aperis nova numero de ĝia tre simpatia, agrabla kaj riĉenhava bulteno “Momenton!”. Sub la redaktorado de Rafael H. Zerbetto kaj (moderna, belega!) grafika arangôo de Lucas Vignolli, oni povas legi informojn, artikolojn kaj beletraĵojn kaj rigardi multajn fotojn. La nuna grupo estranta BEJO-n, havas kiel prezidanton Leandro Souza (Fortaleza/CE), kiel Sekretarion Felipe Queiroz (Florianópolis/SC) kaj kiel Kasiston Rafael Lins (Salvador/BA). Gejunuloj ne forgesu aliĝi al BEJO; kaj veteranoj ne forgesu, ke BEJO akceptas aliĝojn ankaŭ de protektantoj. Ni apogu la kompetentan kaj ageman novan generacion!

LA PROKSIMA RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA VALO OKAZOS EN BARRA MANSA/RJ LA 21an DE JUNIO 2009.

BOLETINS LOCAIS

O Clube de Esperanto de Três Rios/RJ iniciou boletim na Internet, com redação de Celso Tinta: *triek@bol.com.br* . E o tradicional “AMEN!” alcança seu 88º número: *onklobidao@yahoo.com.br* .

MAIS UMA “RUA IDIOMA ESPERANTO”

Foi em Alvorada / RS, por Lei 2040 de 8 de janeiro, sancionada pelo Prefeito João Carlos Brum. O logradouro fica no Bairro Jardim Alvorada.

O PARANÁ TRABALHA!

Ariádene Figueiró convocou assembleia da Associação Estadual para 25 de abril último. São 84 anos de trabalho a comemorar. Parabéns!

ESPERANTO EM MONGAGUÁ

Na cidade litorânea de São Paulo funciona desde 2003 grupo de estudos de Esperanto, no bairro Vera Cruz. Contatos por telefone: (13) 35075792 ou 91639670, com Eva do Esperanto.

ENCONTRO EM GOVERNADOR VALADARES / MG

O 12º econtro de Esperantistas da região, em 06 de dezembro de 2009, será na importante cidade mineira, onde o clube local comemora 50 anos de atividades. Tel.: (33) 32714044, 32752566 ou 32753521.

MAIS UM NÚMERO DE “MOMENTON!”

A Juventude Esperantista Brasileira continua ativa. Com redação de Rafael Zerbetto e diagramação (brlhante!) de Lucas Vignolli, acaba de sair mais um excelente número do boletim “Momenton!”, com notícias, artigos, literatura e muitas fotos. Se você é jovem, não deixe de aderir à BEJO; se é veterano, também não, como membro protetor! A nova geração merece!

NI AMASE PARTOPRENU!
INFORMOJN:
silviomarciocb@yahoo.com.br